

DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.

Redakcio kaj administracio:
Praha XIX., Uralské nám. 447.
Telefona n-ro 718-41.

Redaktas:
ST. KAMARYT.

Senpage por membroj de
Esperanto-Asocio en ĈSR.
Aperas sesfoje dum la jaro.

Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko

rekomendas al ĉiuj interesuloj partoprenon en la unusemajnaj

Cseh-metodaj kursoj en Lázně Bělohrad,

organizitaj de la loka Klubo

25-an de julio — 1-an de aŭgusto 1937.

La kursoj estos du.

1. Kurso por progresintoj.

Por ĉiuj, kiuj volas perfektigi en la lingvo. Estos instruataj: literaturo, historio, gramatiko de Esperanto, konversacio.

2. Kurso por Cseh-metodaj instruistoj.

Por ĉiuj, kiuj deziras ricevi diplomon de Cseh-metoda instruisto.

Pri Cseh-metodo prelegos *Sigismundo Pragano*, speciale komisiita de P. Andreo Cseh. Pri literaturo, organizo, historio, gramatiko, propagando ktp. prelegos eminentaj spertuloj.

Kurskotizo: La 7-taga restado (kurs-honorario + manĝo + loĝado en dulita ĉambro) koston 300— Kč (46 svisaj fr.). Manĝado estos en bona restoracio, la ĉambroj tre puraj. Kiu volas loĝi en unulita ĉambro, alpagos 30 Kč. Kiu dezirus loĝi en luksa Grand-hotelo Urban (fluanta varma kaj malvarma akvo, lifto) kaj manĝi tie, alpagos Kč 100—.

Ambaŭ kursoj komencos la 25-an de julio (dimanĉon) je 20-a horo per interkonatiĝa vespero. La lecionoj estos en burĝa lernejo ĉiutage de la 9-a ĝis 13-a h.

Posttagmeze oni aranĝos ekskursojn per piede aŭ aŭtobuse en belan ĉirkaŭaĵon (rokaro Bohema Paradizo, kastelruino Pecka, Kumburk, Bradlec, mond-fama ruino Trosky ktp.) En banloko ludas unuaranga orkestro koncerta kaj danca.

Ĉiutage vespere okazos kunvenoj de ĉiuj samideanoj (ankaŭ ne partoprenantaj la kursojn, gastoj de Esperantista Libertempejo kaj lokaj klubanoj) kun bona programo.

Fervoja rabato: Fremdaj vizitantoj de Ĉeĥoslovakujo havas 50% rabaton por revenvojaĝo, se ili restis en Ĉeĥoslovakujo minimume 6 tagojn kaj aĉetos ĉe vojaĝoficejo aŭ ĉe fervoja oficejo en Lázně Bělohrad (oficistoj parolas esperante) kontrolbileton montrinte la pasporton kaj fervojbileton. (Tial ili ne redonu ĝin en la stacidomo!) Kiu restis en Lázně Bělohrad minimume 10 tagojn, rajtos 66²/₃% rabaton, se li petos ĉe vojaĝoficejo aŭ ĉe fervojstacio Lázně Bělohrad apartan „Legitimilon por vizitantoj de ĉeĥoslovakaj banejoj“; la 10-tagan restadon atestos la banloka kasisto (Esperanto parolata). — Ĉeĥoslovakianoj, kiuj restis en Lázně Bělohrad minimume 10 tagojn, rajtas 50% rabaton por revenvojaĝo, se ili petis veturonte al Lázně Bělohrad ĉe sia fervojstacio apartan „Legitimilon por vizitantoj de ĉeĥoslovakaj banlokoj“. La 10-tagan restadon atestos banloka kasisto (parolas esperante).

Kun ambaŭ rabatitaj biletoj oni povas reveni aŭ per plejmallonga fervojlinio al limstacio, aŭ tra ĉefurbo Praha.

Aliĝo: Aliĝante al la kurso sendu Kč 150— per poŝtmandato al „Esperantista klubo Lázně Bělohrad“. Aliĝu tuj (plejmallfrue la 15an de junio), ĉar alie ni ne povus garantiĝi al vi la loĝejon). Dum julio estas ja multaj gastoj en baneja urbo Lázně Bělohrad. Sabaton la 24an kaj dimanĉon la 25an de julio atentos ĉe ĉiu vagonaro samideano por akompani vin al loĝejo. Se vi deziras veni pli frue, anoncu vin per letere aŭ, alveninte, ĉe deĵoranta fervoja oficisto (staciestro s-ano Beran estas prezidanto de Esperantista klubo). Ĉiun korespondaĵon pri la kursoj adresu al Esperantista Klubo en Lázně Bělohrad (Ĉeĥoslovakio)!

Divido de la laboro de funkcioj de EAĈSR.

La unua komitata kunveno, la 3. IV. en Praha, dividis funkciojn de la komitato elirinta el elektoj en Mor. Ostrava. Ĝi ankaŭ konservis plejparte dividon de la laboro en la komisionojn funkciintajn pasintan aron. Precipe kontente ni konstatas, ke ni povas enskribi du—tri novajn komisionanojn. Ni fidu, ke la komisionanoj trovos por si taskojn plenumotajn kaj plenumoblajn.

Komitatanoj:

Prezidanto *Dr. Stan. Kamaryt*, Bratislava, Zochova 3.
 Vicprez. *PhMr Franz Höfert*, Znaim, Olakar-str. 2.
 Vicprez. *Otto Ginz*, Praha II., Stárkova 4.
 Ĝen. sekr. *Robert Bloch*, sekret. en poŝtministerio, Praha XVI., 106.
 Kasisto *J. Friedrich*, Košice, Jarná 13.
 Sekretario *Josef Karl Donner*, ŝparkasa oficisto, Plan ap. Marienbad.
 Librotenisto *Ing. Lad. Krajc*, Mor. Ostrava VII., Husitská 52.
 Komitatanoj: *Vuk Echtner*, Praha, Nusle II. 741.
Frant. Heikenwälder, librotenisto, Prostějov, Vrchlického 18.
Ludoviko Krysta, Český Těšín.
Jaroslav Šustr, komercisto, Praha, Dlouhá 53.
Josef Vondroušek, bankolicisto, Brno, U botanické zahrady 31.

Vickomitatanoj:

Frant. Buhr, Praha XVIII., Bělohorská 189.
Josef Kožený, profesoro, Ml. Boleslav, Nádražní 158.
 Ing. *Rud. Novák*, Plzeň, Mánesova 59.
Josef Poncza, Ropice apud Český Těšín.
Miloslav Staněk, komerca administristo, Praha XI., Biskupcova 21.
Růžena Vilémová, komercistino, Uh. Hradiště, Fanderlíkova ul.

Membroj de Kontrola komisiono:

Jaroslav Bartoň, librotenisto, Košice, Česká 10.
J. V. Dolinský, iaka instruisto, Turč. Sv. Martin, Mudroňova 31.
J. V. Šamla, redaktoro, Brno, 14, Alešova 51.

Vicmembroj de Kontrola kom.:

Teodor Kilián, profesoro, Třebíč.
Frant. Staněk, arkitekto, Praha XI., Biskupcova 11.

Komisionoj:

Centra oficejo:

Frant. Slavík, librotenisto, Praha XIX., Uralské 447.

Administro de membroj:

Jaroslav Bároch.

Propagando

(instigado, personaj rilatoj individuaj): *J. K. Donner*.

Fondo de lokaj grupoj:

J. Friedrich, (*Fr. Křettnský*, oficisto, Slez. Ostrava, ul. 28. Májna, 329).

Cseh-metodaj instruistoj:

Ing. *L. Krajc*.

Eldonado de Bulteno:

Stan. Kamaryt, *V. Echtner*, *O. Ginz*, *Fr. Slavík*.

Gazetara servo:

O. Ginz (*Mil. Staněk*, *J. Dlabac*, *Chlebový*).

Radio:

J. V. Šamla.

Literaturo:

Dr. Tomáš Pumpr, Praha XIX., ul. Nár. Obrany 7, (*O. Ginz*).

Turismo

(kune: kongresaj aferoj, prizorgado de fervojaj rabatoj, faciligoj pri vizitoj, propagando por vizito de nia lando): *Robert Bloch*.

Ekspozicia materialo:

Emil Beran, staciestro, L. Bělohrad.

Lernejoj kaj aferoj:

Dr. Stan. Kamaryt.

Skoltoj:

Fr. Buhr.

Junularo:

Vuk Echtner.

Raportoj al fremdlando:

Vlad. Staný, Mor. Ostrava VII-Vítkovice, Třebitzského 29.

Sciencaj aferoj:

Dr. Stan. Kamaryt, (*Ing. Rud. Novák*).

Normigaj aferoj:

PhMr Franz Höfert.

Poŝtistaj aferoj:

Rob. Bloch.

Policianoj kaj ĝendarmoj:

Josef Vávrovský, Praha II., Vodičkova 34 (III-III).

Tramistoj:

Adolf Dlabac, Praha, Dejvice, Belcrediho 915.

KRONIKO ESPERANTISTA EN ĈSR.

Prelegoj de J.R. Scherer en Ĉeĥoslovakio.

La unua loko, kiun nia prelegisto vizitis, estis *Praha*, kie li restis en amika rondo de la 6. I. ĝis la 12. I. Lian prelegon en la urba biblioteko, kiun aranĝis Esperantista Klubo en Praha, ĉeestis 150 personoj; tradukis s-ano J. Šustr. Duan prelegon pri Hollywood li havis en la Franca Rondeto antaŭ 100 personoj, tie li prelegis france. Du sukcesplajn prelegojn aranĝis la ĉina kaj japana sekcioj de Orienta Instituto. La unuan vizitis 100 personoj, inter ili ankaŭ la ĉina ministro, la duan 70 p. Ambaŭ estis en la angla lingvo.

En *Mladá Boleslav* prelegis Scherer antaŭ 60 p. la 13. I. en la hotelo *Věmec*. Tradukis prof. Kožený.

En *Dol. Bousov* okazis la 14. I. en la kinejo prelego pri Japanujo antaŭ 350 p., tradukis Dro Fr. Vaněk. La venontan tagon aŭskultis prelegon pri Hindujo 300 lernantoj, tradukis s-ino Košvancová kaj s-ano A. Bobek.

La lasta stacio en Bohemio estis *Pardubice*. Prelegon pri Singapoor, kiun tradukis s-ano Nálévka, aŭskultis 180 lernantoj de la komerca lernejo, kaj la vesperan prelegon pri Ĉinujo, kiun tradukis s-ano Jandík, 70 p.

En *Zwittau* zorgis pri Scherer s-ano K. Karger, membro de GEL. La lernejan prelegon 20. I. ĉeestis 70 lernantoj, la publikan prelegon 50 p. Ambaŭ prelegoj estis en la germana.

21. I. okazis en *Mor. Ostrava* 3 prelegoj: 2 lernejoj antaŭ sume 1600 lernantoj, la publika en *Dům umění* antaŭ 100 p. Aranĝis la loka grupo de EAĈSR, tradukis inĝ. L. Krajc.

22. I. en *Bohumín* parolis Scherer en la fabrika hotelo germane al 100 p. Aranĝis „Amuza klubo de la lerajfabriko“ laŭ instigo de s-ano Adámek.

Post 2 tagoj de la ripozo en Tatroj venis Scherer al *Košice*. Germanan paroladon pri Japanujo, kiun aranĝis Deutscher Kultur-Verband, aŭdis 100 p., la publikan prelegon pri Hollywood kun traduko de s-ano Szeemann 300 p. kaj la prelegon pri Usono 320 lernantoj de la industria lernejo. Ĉi tiun tradukis Ing. Fischhof kaj s-ano Szeemann. Ambaŭ aranĝis la loka grupo de EAĈSR.

En *Prešov* aranĝis la prelegojn la gimnastika societo Sokol. Dum unu tago la 28. I. okazis tie 5 prelegoj en la germana kun slovaka traduko: tri prelegoj por 427 lernantoj, la kvara por 152 soldatoj kaj la kvina por 76 p.

Ankoraŭ pli efikplena estis la restado en *Spišská Nová Ves* la 29. I., kie aranĝis ankaŭ Sokol 4 prelegojn. 3 el ili ĉeestis 1700 lernantoj, la vesperan 130 p. Tradukis s-ano J. Friedrich el *Košice*.

Post longa vojaĝo atingis Scherer urbeton *Tisovec* kun 4000 loĝantoj. La bonega preparo de la loka grupo de EAĈSR kaŭzis, ke la vesperan prelegon

en la Sokolejo, kiun tradukis s-ano Víttek, vizitis 550 personoj.

Denove longega salto al Moravio. 3. II. parolis Scherer jam en *Uh. Ostroh* en la loka Sokolejo antaŭ 140 p. Aranĝis la Kultura Societo, tradukis s-ano D. Bartošík el Hluk.

4. II. vizitis la Sokolejon en *Hluk* 350 p., tradukis s-ano Fr. Omelka.

5. II. tradukis denove D. Bartošík en *Uh. Hradiště* antaŭ 75 p. Aranĝis Slovaka E. Klubo.

Post la vizito de Zlín venis Scherer al *Brno*, kie li prelegis antaŭ 145 p. kun traduko de s-anoj Jeřábek kaj Vondroušek. Aranĝis la loka klubo de EAĈSR. En *Třebíč* okazis 10. kaj 11. II. 4 prelegoj. La unuan aŭdis 400 lernantoj de le gimnazio kaj la publikan 100 p. Aranĝis laŭ la instigo de prof. Kilian la loka turista klubo; la gimnazian tradukis s-ano K. Koráb, la 3 ceterajn prof. Th. Kilian.

La lasta stacio estis *Znojmo* (Znaim). Laŭ la instigo de la vicprezidanto de EAĈSR Fr. Höfert aranĝis Deutscher Stadtbildungsausschuss germanan prelegon pri Japanujo por 300 p.

Resumo: S-ano Scherer okazigis en Ĉeĥoslovakio dum 38 tagoj 37 prelegojn (el ili 15 lernejajn), sume aŭskultis lin 9165 personoj. El la prelegoj estis 24 en esperanto, 10 en la germana, 2 en la angla kaj 1 en la franca lingvoj.

Krome rakontis s-ano Scherer pri siaj vojaĝaventuroj en 8 kunvenoj de esperantistoj.

Rekordoj: La plej multaj aŭskultantoj (kaj dum 1 tago) estis en *Spišská Nová Ves*, nome 1830. La plej grandan nombron dum unu prelego havis Mor. Ostrava (800 p.), la plej forte vizitita vespera prelego estis en Tisovec (550 p.) kaj relative plej granda nombro de la lokaj vizitantoj estis en Dol. Bousov (650 p. el 2000 loĝantoj).

Laŭ tiu ĉi seka elnombrado oni povas imagi al si, kiom utilan laboron s-ano Scherer faris en nia lando dum mallonga tempo. Estas senbezzone akcenti, ke liaj rakontoj pri la ekzotikaj landoj tre plaĉis, kaj ke precipe junularo estis ensorcita per lia intima maniero de rakontado.

Rimarkinde estas, ke proksimume duono de aranĝintoj, kiuj bonvolis respondi la demandojn de la ĉefaranĝinto J. Friedrich, anoncis ankaŭ la financan profiton, la ceteraj nur tre malgrandan deficiton, kiun oni eĉ ne povas nomi deficiton, ĉar la malgranda sumo ŝajne perdita estas ja sumo elspesita por bona propagando. Ni povas ĝoje konstati, ke sole unu urbo havis pli grandan deficiton, iom pli ol 150 Kč. Ni esperas, ke tiuj ĉi rezultoj kuragiĝos ankaŭ esperantistojn en aliaj lokoj por aranĝi similiajn entreprenojn en la estonteco.

Fine ni dankas ĉiujn niajn kunhelpantojn en diversaj lokoj, kiuj ebligis al ni teni s-anon Scherer en nia lando dum plej longa tempo kompare al la aliaj eŭropaj landoj.

La agado de Cseh-instruistoj Erika kaj Henrik Seppik. Ĉar s-ino Erika Seppik forlasis jam nian landon kaj ŝia edzo sekvos ŝin en plej proksimaj tagoj, estas tempo por raporti pri ilia agado en nia respubliko. Pri ilia laboro en Bratislava kaj Uh. Hradiště ni raportis jam en la 6-a n-ro de nia Bulteno 1936. Aldone ni povas ankoraŭ diri, ke s-ino Seppik prelegis dufoje en *Hluk* antaŭ 540 p. S-ino Seppik vizitis jam en decembro *Josefov* kaj *Jaroměř*, kie ŝi prelegis 12. kaj 13. XII. pri Estonio. En tiuj ĉi urboj ŝi poste laboris dum januaro kaj februaro instruante en du kursoj 48 p. Ankaŭ en *Hradec Králové* ŝi instruis 20 komencantojn kaj 8. I. ŝi prelegis antaŭ 140 p. Dum sia restado en tiu ĉi regiono ŝi vizitis ankaŭ samideanojn en najbaraj lokoj kaj plivigliĝis tiel iliajn rondojn. Specialan meriton pri ŝiaj entreprenoj en tiu ĉi regiono havas s-anoj Fr. Páv kaj Fr. Pytloun. Post la kursfina festo en Jaroměř, kiun partoprenis 80 p. kaj kiu tre bone sukcesis, transiris s-ino Seppik en la regionon de Mor. Ostrava helpi sian edzon, kiu tie laboris jam de la komenco de januaro kaj havis tie rimarkindajn sukcesojn. — S-ano Seppik laboris dum novembro—decembro en *Brno*. Post la bonega preparo, kiun gvidis nia lerta s-ano J. Vondroušek, atingis la nombro de la kursanoj 120 p. Krom la prelego pri Laponio, kiun ĉeestis en Brno 5. XII. 120 p., prelegis Seppik 3. XII. en *Svitavy* pri Estonio (antaŭ 50 p.) kaj 9. XII. en *Ivančice* pri Laponio antaŭ 100 p. La lastan prelegon tradukis s-ano J. Žák el Sřelice. Speciale ni devas atentigi pri la kunlaboro de Seppik kun radio kaj pri aparta kurso, kiun li gvidis en la artista societo TRAKT. La kursfinan feston en Brno partoprenis 130 p., kiuj en bonega humoro pasigis tiun ĉi adiaŭan vesperon. — Speciale efikplena estis agado de s-ano Seppik en la regiono de Mor. Ostrava. La konata labor-trio ing. Krajc, Křetínský kaj Slaný preparis bonege la kampon, 300 grandaj afiŝoj kun la portreto de Seppik, 10.000 flugfolioj kaj speciala reklamo en ĉiuj tramoj anoncis la alvenon de Seppik. Jen en la ciferoj la rekorda rezulto: De januaro ĝis la mezo de aprilo okazis en tiu ĉi regiono 10 prelegoj pri Estonio por 3780 personoj, 9 prelegoj pri Laponio por 2815 p., 5 prelegoj pri Svedujo por 1210 p., sume 24 prelegoj por 7805 personoj. Provlecionoj por 1775 personoj. Sume 39 prelegoj kaj provlecionoj por 9580 personoj. Kursoj okazis en: Mor. Ostrava 50 pers., daŭriga 30 p., Vřtkovice 35 p., Sl. Ostrava (knabina gimnazio) 30 p., Třinec 80 p., Bystřice n. O. 20 p., Frýdek-Místek, burĝa lernejo 40 p., vespera 25 p., Petřvald 50 p., Orlová 40 p., sume 400 personoj. — Prelego, provleciono aŭ kurso okazis en: Mor. Ostrava, Vřtkovice, Sl. Ostrava, Třinec, Ĉ. Těšín, Orlová, Petřvald, Frýdek, Místek, Bystřice n. O., Dolní Suchá, Karvinná, Poruba, Doubrava, Radvanice kaj Kopřivnice. Krom tio havis s-ino Seppik 3 prelegojn en Nový Jičín antaŭ 500 p. kaj,

dum ni skribas tiujn ĉi liniojn, oni preparas prelegon en Nový Bohumín. Entute do 18 lokoj estis atingitaj per nia verda atako. Fine ni devas mencii 3 radioparoladojn kaj plurajn vizitojn kaj paroladojn en esp. kluboj. — Ni povas konstati, ke la nunjaraj laboroj de geedzoj Seppik havis ampleksan efikon kaj pro ilia agado tre plivigliĝis la movado en la regionoj, kie ili instruis. Estas nur dezirinde, ke la kunhelpo de Cseh-instruistoj en nia lando estu ankoraŭ pli vasta, ĉar per ilia klopodo ni atingis mediojn, en kiujn ni ne sukcesis ĝis nun enpenetri. Nia asocio invitos por tiu celo krom Seppik ankoraŭ aliajn talentajn instruistojn kaj ni *tre petas ĉiujn klubojn, ke ili sendu siajn aliĝojn jam nun* laŭ la adreso Ing. L. Krajc, profesoro, Mor. Ostrava 7, Vřtkovice, Husitská 52, kiu sendos la bezonajn informojn. Estas grave, ke la Asocio sciujam nun, kiu havas intereson pri la aŭtunaj Cseh-metodaj kursoj, ĉar tio faciligas ĉiujn preparojn. Samideanoj, jen via tasko! Ne timu la riskon! Kun Cseh-metoda instruisto vi havos sukceson!

Laboristoj. Al la jam ekzistantaj bultenoj laboristaj aliĝis en januaro 1937 ciklostilita „*Proleta Esperantisto*“ eldonata de Alfons Liberda en Mor. Ostrava-Vřtkovice, Štefánikova 67. Li eldonis ankaŭ 8-paĝan flugfolion ĉeĥlingvan „*Mezinárodní jazyk a jeho význam pro dělnictvo*“, po 50 h.

Komerco. La Slovaka fabriko por legomkonservoj František Jančík en Tornok faris por sia tomata pasto ladajn ujojn kun jena esperanta teksto: „Plej bona el la plej bona estas la ekstrakto Tomavita, produktita el maturaj tomatoj de propra rikolto en nia speciala fabrikejo. Perfekte anstataŭas freŝajn fruktojn. František Jančík, Tornok, Slovakio, ĈSR.“ Mendu ĉe via liveranto.

Ŝtataj ekzamenoj denove eblaj. Ĉe ekzamenita komisiono por instruistoj de burĝaj lernejoj en Bratislava estis la 27-an de aprilo s-ro Jar. Procházka, faka instruisto en Vel. Uherce, ekzamenita pri esperanto, kiel laŭvola fako por burĝaj lernejoj. Ĝi signifas reakiron de la grava pozicio. Nun povas esti ekzamenataj sole instruistoj kaj profesoroj. Provizore sole ĉe la komisiono en Bratislava. Sed versimile ministerio nomigos ekzamenantojn ankaŭ ĉe la aliaj komisionoj.

Esperanto-tago en Uherské Hradiště la 3--4an de julio estos grava entrepreno. La divido de la tempo estos jena: Sabato la 3. VII. 1937 je la 20 h.: Amuza vespero kun belarta programo. Dimanĉo la 4. VII. 1937 je la 9 h.: Laborkunveno pri temoj: 1.) Instruado de Esperanto en publikaj kursoj. 2.) Instruado de Esperanto en lernejoj. 3.) Turismo. 4.) Signifo de nombro en la organizo. Je la 14 h.: Komuna vizito de la ekspozicio. Detaloj sekvos. Jam nun preparu Vin!

Informoj.

Esperantaj poŝtmarkoj. La novajn esp. p.-markojn, eldonitajn en Brazilo, vi povas ricevi en fermita koverto por 2 respondkuponoj senditaj al Brazila Ligo Esperantista, Av. Marechal Floriano, 212, Rio-de-Janeiro, Brazilo. Por 4 respondkup. oni ricevas per rekomendita letero la 3 pm. en koverto kaj la samajn sur la koverto. Unu el la pm. oni povas ricevi senpage petante pri tio per ilustrita poŝtkarto s-ron Ismael Gomez Braga, rua José Vicente, 79, Andarahy, Rio-de-Janeiro, Brazilo.

Zamenhof-portreto sur poŝtkarto, kolora. La sola bildo, kies modelo estis persone la Majstro. 5 ekz. Kč 3— afr.

Literatura Mondo, la sola literatura gazeto, en kiuj kunlaboras ĉiuj gravaj verkistoj esperantistaj. Abonu por 60 Kč jare ĉe EAĈSR. Specimena n-ro 3 Kč.

Lingvo-Libro informas vin kvaronjare pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj. Tri ekz. kune sendataj 18 Kč jare ĉe EAĈSR.

Kunlaboranton en Ĉeĥoslovakio, spertan esperantiston, serĉas ing. Paul Tarnow, Düsseldorf-Oberkassel, Düsseldorfstr. 5, por sciencaj laboroj celantaj statistikon mondlingvan.

Okupon en ĉeĥa regiono serĉas samideano el norda Bohemio por lerni la ĉeĥan lingvon. Li perlekte majstras ĉiujn oficejajn laborojn, scias bone maŝinskribi, havas bonajn spertojn pri librotenado kaj estas ekzamenita ŝoforo por persona kaj ŝarĝa aŭto. Li havas plej modestajn postulojn kaj akceptos iun ajn okupon. Kiu povas helpi la samideanon, skribu al la oficejo de EAĈSR, Praha 47.

Karavano el Svedlando. 12 fervojistoj, gvidataj de s-ro Malmsten, vizitos nian landon. Alveno dimanĉe 16-an de majo je 15:54 h al Praha stac. Masaryk, forveturo el Praha stac. Wilson 18-an de majo je 8:40 h. Alveno al Bratislava samtage je 15:06 h, foriro el Bratislava merkrede 19. V. je 15:15 h, alveno al Nové Zámky je 16:52 h, forveturo el Nové Zámky vendrede 21. V. je 9:28 al Wien. Samideanoj en ĉiuj lokoj zorgu pri la svedaj gastoj!

Novaj glumarkoj de EAĈSR

trikoloraj — aperis. Unu folio, 84 markoj en 4 div. desegnoj Kč 4—, 10 folioj 36 K. Mendu rapide ĉe EAĈSR.

Oficiala vortaro de Esperanto

de S. Grenkamp enhavas ĉiujn oficialajn radikojn kun esperanta difino. 260 paĝoj 11x14 cm, bone bindita. Kč 27— ĉe Libroservo de EAĈSR.

Samideana vortaro de J. Šupichová

Sprita broŝureto de granda eduka valoro. Mendu ĝin tuj por Kč 2.50 ĉe EAĈSR.

Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Libroj, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de EAĈSR atrankite por la notita sumo.

Jiří Wolker, Balado pri okuloj de l'heftisto. Trad. J. V. Šamla. Ilustr. de Fr. Břilkovský. Eld. Ligilo, Prostějov, en 650 ekz. sur japana papero. Bonguste broŝurita. 20 pĝ 15x21 cm. Prezo Kč 5:20. — Fama poemo de la june mortinta poeto ĉeĥa. Dankindaj estas la diligenta tradukanto Šamla, kiu sukcese klopodas konigi al eksterlando famajn verkojn de nia literaturo, kaj la eldonejo, kiu donis al la libreto veston tre plaĉan.

Valoj muĝu de kantad'. (Eldono de slovakaj kantoj kun fortepiana akompano.) Tia estas esperantlingva titolo de nova kolekto de kantoj, kiun komencis eldoni Ján Geryk en Turĉ. Sv. Martin. La tekstoj estos slovakaj, la lasta paĝo, sen muziknotoj, surhavas tekston en slovakaj, angla kaj esperanta lingvoj. La unua kajero estas la kantoj adaptitaj de M. Schneider Trnavský („Plugas Joĉjo, plugas...“, „Štydiri, ŝtydiri...“). La dua numero estos de Ján Valaštan Dolinský („Domaĝegas ami vin, frauleto...“), la tria de M. Schneider Trnavský („Sabateto venas...“), la kvara de V. Figaš Bystrý („Supren al Hron...“). Unu kajero kostas 6 Kč. Ĝi estas ricevebla de nia sekretario. La kantoj estas tre agrablaj por kanti. Amantoj de bonaj kantaĵoj mendu ilin nepre!

Jiří V. Šamla, Moderní učebnice mezinárodního jazyka. Desegnoj de O. Crhounek. Eld. Moravia eldonejo B. Pištělák, Brno. 80 pĝ 14x21 cm, kun aparte broŝurita vortaro sume 116 pĝ. Prezo Kč 9:80. La konata laboranto ĉe la Verda stacio de Brno verkis novspecan lernolibron. La gramatikon sekvās artikoloj pri diversaj temoj kun aldonitaj klarigoj de fakaj esprimoj. La bona helpilo varbos certe multajn novajn amikojn al lingvo internacia.

Jiří V. Šamla, Šamlův lidový slovník esp.-český a česko-esperantský. 36 pĝ 14x21 cm. Prezo Kč 1:70. Aparte vendebla vortareto, kiu estas ĉetere aldona al la supra lernolibro.

Jiří V. Šamla, Lidová učebnice esperanta. Eld. Nový lid, Brno. 32 pĝ 15x21 cm. Prezo Kč 1:70. Sur malmultaj paĝoj sciis fari Šamla lernolibron, certe multe disvastigotan. Enestas amaso da lerte faritaj bildoj, sur kovrilto bona fotomuntaĵo.

A. Berka, Slovník česko-esperantský. Eld. Aleš Berka, Brno. 100 pĝ 10x14 cm. Prezo Kč 5:20. Ni estos kontentaj, se la grandaj planoj de tiu ĉi nova „Eldonejo de malkaraj libroj“ efektiviĝos, sed ni devas rimarki, ke ĝia unua eldonaĵo, la unu vortareto, ne estas relative malkara. Sed rekomendinda!

Plena Gramatiko de Esperanto. Literatura Mondo informas ĉiujn aĉetintojn de la unua eldono, ke la dua eldono estas ĵus prespreta. Ĝi estos ĉirkaŭ 100 paĝojn pli granda ol la unua kaj la eldonejo ŝanĝos

por ĉiu la unuan eldonon je la dua. La aĉetintoj, se ili hazarde ne ricevis la necesajn informojn antaŭ la 1-a de novembro, povas ĝin havigi de la eldonejo aŭ de la firmo, kiu liveris al ili la libron. Kiuj ne deziras ŝanĝi, rajtas aĉeti la duan eldonon por la duona prezo.

ETA-Poŝtmarka albumo. Eld. Unuiĝo de jugoslavaj PTT-istoj. Red. N. Lisac, Sarajevo. Ĝis nun 2 kajeroj po 16 pĝ 24x17 cm. Prezo Kč 3·50 por 1 kajero. Detala albumo, kiu ĝis nun ampleksas ĉiujn poŝtmarkojn de Jugoslavio. Venonta kajero enhavos pm de Bosnio kaj Hercegovino. Ĉiuj pm estas precize priskribitaj en lingvoj kroata kaj esperanta. La eldonaĵo estas bonega ideo, certe salutota de niaj filatelistoj. Necesas rapida mendo, ĉar eldonkvanto estas limigita.

Enrico Molnár-Selli, Republika bez žen. Eld. Ĉsl. graf. Unie, Praha. 136 pĝ 13x20 cm. Riĉe ilustrita. Prezo broŝ. Kč 25—, bind. Kč 30—, tolbind. Kč 36—. Juna esperantisto el Praha vojaĝis al la nefacile alirebla monaĥa respubliko de Athos kaj donis al ni riĉan priskribon de ĝi kaj de ĝia vira loĝantaro, kiu estas tiel kontraŭina, ke ĝi ne permesas eĉ eniron de bovino. Tial ĝiaj loĝantoj ne trinkas lakton. Multajn aliajn aferojn interesajn kaj ĝis nun ne aperintajn en ĉeĥa literaturo ni legas en la libro, verkita en viva stilo. Por ni ĝi estas speciale interesa pro ripetaj aludoj de esperanto kaj de ĝia utilo al la aŭtoro. Esperanto faciligis al li grave la vojaĝon kaj kun monaĥo-esperantisto li renkontiĝis en unu el la monaĥejoj multcentjaraj.

E. v. Veenendaal-Bouwens, Internacia Esperanto-Legolibreto. Ilustr. de C. Helleman. Eld. La Juna Vivo, Vest-Graafthijk (N. H.), Nederlando. Prezo Kč 3·70. La simplajn lecionojn el „Juna Vivo“ reprenis la eldonejo en tiu ĉi libreto. Same kiel ni salutis la eldonon de tiu bona kaj kun amo redaktata revueto, ni ĝojas pri apero de la malgranda lernolibro. Pura kaj bongusta, kvazaŭ spegulo de Nederlando.

Emba, Maria kaj la grupo. Originala romano. Eld. Literatura Mondo, Budapeŝt. Lasta volumo de C-serio de AELA 1935. 176 pĝ, 20x13 cm. Prezo broŝ. Kč 22·30, bind. Kč 30·35, en luksa bindo kaj sur luksa papero Kč 41·50. Pri vivo en esperantista societo, pri multaj neseriozuloj tie kaj pri la nemultaj, kiuj komprenis ĝuste la celojn de esperantista organizo. Do romano kun temo pure esperanta, kiu nin devas interesi kaj eble ankaŭ instrui. Lingvo pura.

Edmondo de Amicis, Koro. Libro por knaboj. Trad. * Eld. A. Paolet, S. Vito al Tagliamento. 316 pĝ 13x19 cm. Prezo broŝ. Kč 26—, bind. Kč 36—. Jam depost kelkaj jardekoj junuloj en la tuta mondo legis tiun ĉi libron, plenan da karakteroj modelaj kaj da scenoj vere kortuŝaj. Tiu klasika

libro junula devis aperi ankaŭ en traduko esperanta, kiu estis nun bone farita de nenomita samideano itala.

P. Th. Justessen, Rafflesia Arnoldi. Bildo kun teksto. Kopenhavn 1936. 8 pĝ 22x28 cm. Prezo 6 Kč. Scienca priskribo de giganta floro, observita de la aŭtoro en Sumatra. Valora aldono al nia nerica scienca literaturo.

P. Th. Justesen, Verema raporto pri la German-Molsa milito. Eld. la aŭtoro, Fannerup, pr. Kolind, Danujo. 24 pĝ 13x19 cm. Prezo Kč 4·30. La ĉeĥa Kocourkov, germana Schilda estas ĉe la danaj Molso. Estas fabela loko, kie pro naivegeco de la loĝantoj okazas aferoj nekredeblaj kaj ĉiam ridindaj. Estis dankinda ideo konigi tiujn rakontojn per esperanto al la mondo, tiujn rakontojn cetere apenaŭ aŭditajn. La lingvo estas klara kaj surprizas kelkaj eraroj kiel „maljunaj historietoj“ (en titolo), „maljuna pafilo“ (pĝ 13, anst. malnovaj, malnova), „monokula“ (4, anst. unuokula), „fronto“ (5, anst. frunto).

N. Bartelmes, Junece ardo. Eldonis SAT, Paris. 120 pĝ 13x19 cm. Prezo Kč 11·20. Pri nefacila vivo de du proletaj knaboj dum la postmilitaj jaroj kaj pri ilia konscia lukto kontraŭ la malamikaj fortoj ilin ĉirkaŭantaj. Valora eldonaĵo al nia originala literaturo.

H. Roland Holst v. d. Šalk, Frateco en la vivpraktiko. Trad. H. A. Buis. Eld. SAT, Paris. 28 pĝ 11x15 cm. Prezo Kč 2·20. Pri manko de komuna sento kaj pri ĝia neceso, se la homaro volas saviĝi antaŭ la grandegaj katastrofoj ĝin minacantaj.

P. G. de Bruin, Laborista esperanta movado antaŭ la mondmilito. Faktoj kaj dokumentoj. Eld. SAT, Paris. 36 pĝ 14x20 cm. Prezo Kč 6—. Utila broŝuro donanta bonan rigardon super la movado kaj precipe kompletan super la movado laborista. La libreto parolas pri antaŭmilita movado laborista, sed enhavas ankaŭ indikojn tute freŝdatajn, eĉ IEL estas menciita.

Niaj membroj pagantaj senpere, ne per la lokaj grupoj, kaj nepagintaj ĝis nun por j. 1937, trovas en tiu ĉi numero pagilon. Bonvolu ĝin uzi tuj sendante al ni 16— Kč.

Internacia korespondado.

Ernst d'Hérin, 8, rue Gaillard, Romans (Drôme), Francujo, 18-jara filo de mastro en ŝufabriko, deziras korespondi kun ĉeĥoslovaka samideano 15—18-jara.

Ibuŝi Sadako, ĉe Vera Vojo, Kanda, *Cukase-maĉi* 2-3, Tokio. 19-jara knabino, deziras trovi per esperanto amikojn en nia lando. Ŝi kolektas esperantajn katalogojn kaj gazetojn.

Juna japana biologo *Endo Takaŝi*, Zempuzuki-mati 67, Suginami, Tokio, dez. koresp. pri div. temoj. Intŝ. pm. kaj aliajn objektojn.